

## Taglibro en Saga

En dek oka tago de kvara monato, la kvara jaro de Genroku [1691], mi iris al suburbo Saga kaj atingis domon de Kyorai, nomatan “Vilao de persimona falo” [Rakusisya]. S-ro Bontyou kune kun mi alvenis tien, sed jam vespere li revenis al Kioto. Mi devis resti tie pli longe, tial do mi reparis paperajn glitpordojn [ŝoĵiojn], furioze sarkis herboaçon, kaj faris unu angulan çambbron de la vilao mia kuŝejo. Estas çi tie unu tablo, tuçstono, biblioteko, Kolekto de Bai Juyi, Kolekto de çineska poemaro verkita de japanoj (po unu poemo de unu verkisto) [Hontyou itinin issyu], Rakonto pri heredo [Yotugimonogatari], Genzimonogatari, Tosa Taglibro [Tosa nikki], Kolekto de utaoj pri japana vidindejo [Syouyousyuu]. Ankaŭ preta estas multe da diversaj dolçaĵoj en kvinoblaj manĝkestoj, ornamitaj per çina ordeseĝna lakpentraĵo, aldone staras unu botelo da bonkvalita sakeo kun tasetoj. Litaĵoj por tranokto kaj manĝaĵoj-nutroprovizoj estas alportitaj el Kioto kaj nenio mankas. Mi, forgesinte propran malriçon, ĝuas puran libertempon.

Dek naŭa tago.

Posttagmeze ni adorvizitis la templon Rinsen-zi. Antaŭ ĝi fluas rivero Ooi-gawa, dekstre alte staras la monto Arasi-yama, plue daŭras vojo al la vilaĝo Matunoo. Multe da homoj tien kaj reen iradas por kultviziti la Bodhisatvon Kokuzou.

En la bambuaro troviĝas la vilao, nomata Kogou-yasiki [loĝejo de la amatino de imperatoro Takakura]. Nomo de Kogou-yasiki restas en tri diversaj lokoj en la Supra Saga kaj Suba Saga, sed kiu el ili estas vera? Estas çi tie Komadome-no-hasi, la ponto de çevalhaltigo, kie Minamoto Nakakuni [la komisiito de Takakura] haltigis sian çevalon [por viziti Kogou]. Laŭ tiu legendo portempe vera devas esti çi tiu loko. Ŝia tombo troviĝas en bambuaro proksime al Sangenya [Tri teejoj]. Kiel la signo estas plantita la çerizo. Kvankam pompe ŝi vivis en brokaĵo, tamen mortis fine kiel rubo en vepro. Tio rememorigas al mi la epizodon pri salko en la vilaĝo de Wang Zhaojun kaj floroj çe maŭzoleo de Wu Nü [en la verso de Bai Juyi].

Estas triste al la homo

Finfine ŝanĝiĝi

En bambuŝoson.

[Ukihusi ya take no ko to naru hito no hate]

La monto Arasi-yama,  
Tra bambuara denso  
Strio de vento.

[Arasi yama yabu no sigeri ya kaze no suzi]

Kiam la suno subiras, ni revenis al la vilao de persimona falo. S-ro Bontyou venis el Kioto. Kyorai reiris al Kyoto. De frua vespero mi enlitiĝis.

Dudeka tago

S-ino Ukouni [ledzino de Bontyou] alvenis por spekti la feston en Norda Saga. S-ro Kyorai venis el Kioto. Li montris al mi sekvan verson, verkitan survoje.

Infanoj, kverelantaj en kampo,  
Estas tiel altaj,  
Kiel tieaj hordeoj

[Tukami au kodomo no take ya mugibatake]

Rakusisya, la vilao de persimona falo, sen restaŭro restas sama tia, kiun antaŭa posedinto konstruis, kaj nun estas detruita tie kaj ĉi tie. Sed nuna povreco pli kortuŝas ol antaŭa pompeco ege polurita. Ĉizitaj traboj kaj pentritaj muroj estas rompitaĵoj per vento kaj makulitaĵoj per pluvo, kuriozaj ŝtonoj kaj eksterordinaraj pinarboj estas kaŝitaj sub herbaĉo. Tamen antaŭ bambua verando staras unu citronujo kun floroj bonodoraj, mi versis jene:

Floroj de citrono  
Revokas la pasintan,  
Ĉambron de kuirado.

[Yuzu no hana ya mukasi sinoban ryouri no ma]

Kukolo nokte,  
Tra granda bambuaro,  
Penetras lunlumo.

[Hototogisu ootakeyabu wo moru tuki yo]

Bonzino Ukou versis jene:

Denove mi venos,  
Tiam ruĝiĝu rubusoj  
Ĉe la monto de Saga.

[Mata ya kon itigo akarame Saga no yama]

La edzino de pliĝa frato de s-ro Kyorai sendis sukeraĵon kaj mangĝaĵon. Ĉi nokte geedzoj de Ukou restas ĉe mi kaj ni kune kuŝas kvinope en unu moskitkurteno. Estas tre malfacile dormi, tial ĉiuj, unuj post aliaj, ellitiĝas post la noktmezo, kaj, prenante restintan de antaŭa tago sukeraĵon kaj vinon, trababilas proksimume ĝis tagiĝo. Ankaŭ en somero de pasinta jaro, restante en la dometo de Bontyou, homoj el diversaj provincoj enlitiĝis kvarope en unu moskitkurteno je du tatamio. Tiam mi ekversis pri tio: “Ĉar estas kvar pensoj ĉe ni, tial do sonĝoj ankaŭ devas varii je kvar diversaj”. Rememorante nun tion, ĉiuj ekridetas. Post tagiĝo geedzoj Ukou kaj Bontyou revenis al Kioto. Ankoraŭ restis s-ro Kyorai.

Dudek unua tago

Hieraŭ nokte mi ne dormis, kaj mi sentas min malbona. Vetero ne similas al hieraŭa, estas nube ekde mateno, pluvos de tempo al tempo, tial mi kuŝas dormante tutan tagon. Kiam vesperiĝis, Kyorai revenis al Kioto. Ĉi vespere estas neniue, kaj mi ne povas dormi dum nokto, ĉar dumtage mi kuŝis. Do mi netigas, troviĝinte la duonskribaĵon, forlasitan de mi en la ermitejo Genzyuuan, la loĝejo de efemera vivo.

Dudek dua tago

Dum mateno pluvos. Hodiaŭ neniue estas, tiel en soleco mi ĝuis skribadi vane. Ekzemple tiujn vortojn.

“Kiu restas en funebro, tiu faras tristecon ĉefo, kaj kiu trinkas vinon, tiu faras ĝojon ĉefo”.

“Se ne estus soleco, mi sentus min mizera”. Kiam tiele versis Saigyō, li certe faris solecon sia ĉefo. Li ankaŭ versis jene.

En la monta vilaĝo, kiun do la birdeto vokas?

Mi volus vivi unu sole.

[Yamazato ni kowa mata darewo yobu kotori hitori sumamu to omoisi monowo]

Nenio estas pli ĝoja ol vivi sole. S-ro Tyousyou-Insi, la ermito, diris: “Se la gasto ĝuas duontagan libertempon, la mastro perdas duontagan libertempon”. S-ro Sodou ĉiam admiras ĉi tiun vorton. Mi ankaŭ versis jene, sidante sole en unu templo.

Min en spleno

Igu pli trista,

Ho, kukolo kun vana krio.

[Uki ware wo sabisigaraseyo kankodori]

Vespere alvenis la letero de Kyorai.

El Edo revenis s-ro Bukou, kunportis multe da leteroj de malnovaj amikoj kaj disĉiploj. El ili la letero de s-ro Kyokusui diris, ke li vizitis la malnovan Bananan ermitejon, forlasitan de mi, kaj tie vidis la bonzon Souha.

Ĉe la bordo, kie antaŭe

Iu lavadis potojn,

Tie kreskas nun violoj.

[Mukasi taga konabe araisi sumiregusa]

Li ankaŭ skribis jene.

“Mia loĝejo estas longa nur je du pafarkoj [ĉ. kvar metroj kaj duono] kaj estas nenia verda koloro krom unu acero”.

Folioj de juna acero

Fariĝas brunaj,

Tio ankaŭ unu lukso.

[Waka kaede tyairo ni naru mo hitosakari]

En la letero de Ransetu jenaj versoj.

El polvoj de osmundo

Estas disspecigitaj

La pteridioj.

[Zenmai no tiri ni eraruru warabi kana]

Ŝanĝiĝo de servistoj,

Eĉ al infano

Estas korŝire.

[Degawari ya osanagokoro ni mono aware]

En aliaj leteroj ankaŭ sentebles nur multe da karaj kaj kompatindaj.

Dudek tria tago

Manfrapis,

Eĥas. En lumiĝanta ĉielo

Somera luno.

[Te wo uteba kodama ni akuru natu no tuki]

Bambua ŝoso ekmemorigas

Al mi pentradon

En frua infaneco.

[Take(noko) ya osanaki toki no e no susami]

Super hordeaj spikoj

Tinkrataj ruĝe per larmoj

Kantas la alaŭdo.

[Mugi no ho ya namida ni somete naku hibari]

Unu tago post alia tago

Ruĝiĝas hordeo,

Kantas alaŭdo.

[Hitohi hitohi mugi akaramite naku hibari]

Min, sentaŭgan,

Dormeman,

Vekas la kanbirdoj

[Nou nasi no nemutasi ware wo gyougyoushi]

Pri la temo de Rakusisya, la vilao de persimona falo, versis jene s-ro Bontyou.

Jen nun per fabo plantita kampo,  
Jen nun kabano por lignoj,  
Ĉie estis la historie famaj lokoj.

[Mame ueru hata mo ki beya mo meisyo kana]

Vespere venis s-ro Kyorai el Kioto. Letero de s-ro Syoubou el la urbo Zeze. Letero de s-ro Syouhaku el la urbo Ootsu. Bontyou venis. Venis kaj tranoktis ĉe mi s-ro Senna, la ĉefbonzo de la templo Honpuku-zi en la urbo Katada. Bontyou revenis al Kioto.

Dudek kvina

S-ro Senna revenis al la urbo Ootu.

S-roj Humikuni kaj Zyousou min vizitis. La lasta versis ĉinajn poemojn jene.

Pri la temo de Rakusisya, la vilao de persimona falo *Zyousou*

Profunde en la monto Saga vi vivas kun birdoj kaj fiŝoj,  
Dezera ĉirkaŭaĵo, tamen vi ĝuas tion, kaj la loĝejo similas al kampula.  
Nun mankas ruĝaj fruktoj sur branĉoj de persimonoj,  
Sed la verdaj folioj instigas onin lerni kaj skribi poezion.

Pri la vizito al la tombo de s-ino Kogou *Li mem*

Laŭ indigno al tirano Kiyomori forlasis ŝi la kortegon,  
Ĉi tie en azilo brilis nur aŭtuna luno kaj blovis kampula vento,  
Antaŭe oni serĉis ŝin laŭ belsono de ŝia harpo,  
Nun ie en bambuaro troviĝas ŝia soleca tombo.

S-ro Humikuni versis jene.

Jam ekde burĝono,  
Ĝermas duope  
Persimona frukto.

[Medasi yori hutaba ni sigeru kaki no sane]

Survoje versis s-ro Zyousou jene.

Kukolo kantas ĉe celtido,  
Kiu devus anstataŭi  
Florojn de mumeo kaj ĉerizo.

[Hototogisu naku ya enoki mo ume sakura]

Peco de ĉina poemo de Huan Shangu impresas min.

S-ro Chen Wuji strebis versi, ferminte pordon,  
S-ro Qin Shaoyou, akceptante gastojn, donadis siajn versojn.

[*El dek improvizaĵoj dum malsano en Xingjiang*]

S-ro Otokuni venis kaj rakontis pri Edo de Musasi. Aldone li kunportis unu rulaĵon de Hajkai, verkitan dum bruliĝo de kandelo je 1.5 centimetro. El poemoj estas sekvantaj cenaj versoj.

Pomaduĵo de duonlajkulo estas portata ĉe la sino  
[Hanzoku no kouyaku ire wa hutokoro ni]

Por trapasi montokolon de Usui estas pli saĝe per ĉevalo  
[Usui no touge uma zo kasikoki]

*Kikaku*

Li, kun korbo ĉe la talio, freneziĝas de la luno  
[Kosi no azika ni kuruwasuru tuki]

Uragano pasis, unu kabano estas donita al ekzilito  
[Nowaki yori runin ni watasu koya hitotu]

*Li mem*

En la monto Utu, pruntpreninte noktan vestaĵon ĉe virino, li enlitiĝis  
[Utu no yama onna ni yagi wo karite neru]

Mensogo devus esti akuzata, tamen pardonita kaŭze de Abstinenco  
[Ituwari semete yurusu syouzin]

*Li mem*

Vespere ekde 4-a aŭ 5-a horo, blovis, pluvis, fulmis, tondoris kaj hajlis. Grandaj hajloj estas pezaj je tri momme[11,25 gramoj], grandaj - je anzuo, malgrandaj - je kaŝtano). Onidire, hajlas tiam, kiam drako pasas tra la ĉielo.

Dudek sesa tago

Jam ekde burĝono,  
Ĝermas duope  
Persimona frukto.

[Medasi yori hutaba ni sigeru kaki no sane]

*Humikuni*

Kvazaŭ polvoj teren sur kampo  
Faladas petaloj de deŭzio.

[Hatake no tiri ni kakaru unohana]

*Basyou*

Heliko malcerte  
Svingas siajn kornojn.

[Katatumuri tanomosinageni tuno hurite]

*Kyorai*

Li atendas la sitelon kun ŝnuro,  
Dum homo ĉerpas el putro akvon.

[Hito no kumu ma wo turube matu nari]

*Zyousou*

Frue en mateniĝo  
Iras, ŝajne,  
La regula kuriero\*.

(Trifoje en ĉiu monato regule oni portas poŝtaĵon inter Edo kaj Kioto)

[Ariake ni sandobikyaku no yuku yaran]

*Otokuni*

Dudek sepa tago

Neniu venis, tutan tagon mi havis libertempon.

Dudek oka tago

En sonĝo ekdirante pri Tokoku, mi ploregis kun larmoj, kaj vekigis.

Kiam ajn interrilatatas spiritoj, oni sonĝas. Kiam la negativo [Yin] estas elĉerpiĝinta, oni vidas fajron en sonĝo, kaj kiam la pozitivo [Yang] estas febliĝinta, oni vidas akvon en sonĝo. Estas dirite, ke, kiam la birdo flugas kun haro ĉe sia buŝo, oni vidas sin flugi en sonĝo, kaj kiam oni kuŝas sur sia zono, oni vidas serpenton en sonĝo. La sonĝo de Handan en “Zhenzhongji”, la sonĝo de Nanke pri lando Huaian, la sonĝo de Zhuangzi pri papilio, ĉiuj havas sian rezonon, estante neelĉerpitaj je mistero. Mia sonĝo ne estas sonĝo de sanktulo-virtulo. Tutan tagon mi inklinas al fantazio, iluzio kaj alieneco, kaj nokta sonĝo ankaŭ tia. Mi ja sonĝis pri ĉi tiu homo, tio estas, tiel nomata, *nenmu*, la sonĝo de arda deziro. Profunde min estimante, li adore venis al mi eĉ mia hejmloko Iga. Nokte ni kune dormis, kaj dividis malfacilan vojaĝon, helpante unu al alia. Li ĉiam sekvis min dum ĉ. cent tagoj kvazaŭ mia ombro. Iam ni amuziĝadis nin, iam kunĉagrenadis. Lia sento penetris ĝis la fundo de mia koro, tiel do mi neniam forgesas lin. Vekiĝinte, mi ankoraŭ larmegis inunde.

Dudek naŭa tago

Mi legis la poemon pri “Takadati”, la Alta kastelo en la provinco Ousyuu, el libro “Po unu poemo de unu verkisto en Japanio”.

Tri deka tago, la fino de monato

[Tie en la poemo estas skribita jene.]

Alte en ĉielo elstaras Takadati, kaj steloj similas al kasko,

La rivero Koromogawa fluas al maro, kaj la luno ŝvebas kvazaŭ pafarko.

La pejzaĝo de tiu loko neniom estas konforma al la realo. Se oni ne vidas per siaj okuloj la lokon, tiam oni, kia ajn granda estus antikvulo, ne povas vere esprimi la pejzaĝon.

Unua tago [de kvina monato]

Min vizitis s-ro Riyuu de la templo Meishou-zi el Hirata de la provinco Gou-syuu.  
Leteroj el s-roj Syouhaku kaj Senna.

Bambuidoĵ, ne manĝitaj,

Kreskas kaj rosoj sur ili.

[Takenoko ya kui nokosaresi ato no tuyu]

*Versita de Riyuu*

Mi kutimiĝis

Al ĉi-tiama ĉemizo,

Jam meze de kvara monato.

[Konogoro no hadagi mi ni tuku uzuki kana]

*Versita de Syouhaku*

Longe atendata kvina monato proksimiĝas,

Bofiloj devas sendi al gepatroj de edzino

Frandajon kovritan per bambuaj folioj.

[Matarecuru satuki mo tikasi muko timaki]

*Versita de Syouhaku*

Dua tago

S-ro Sora venis. Li diris, ke li iras al Yosino spekti florojn kaj poste adorvizitos la sanktejon de Kumano. Li, multe kaj diverse kunmiksante, rakontis pri miaj malnovaj amikoj kaj disĉiploj, loĝantaj en Edo.

Vojo al Kumano,

Tien mi eniros profunden,

Fine atingos someran maron.

[Kumano zi ya waketutu ireba natu no umi]

*Versita de Sora*

La monto Oomine kun granda pinto,

Staranta interne de Yosino,

Tie la fina limo de ĉerizfloroj.

[Oomine ya Yosino no oku wo hana no hate]

Posttagmeze ni boatis laŭ la rivero Ooigawa, remis supren laŭ Tonase apud Arasiyama. Ekpluvis, do ni revenis hejmen en vespera krepusko.

Tria tago

De lasta nokto daŭris pluvi, tutan tagon kaj tutan nokton la pluvo ne ĉesis. Respondante al miaj demandoj, li daŭris rakonti plue pri la aferoj en Edo. Dume jam mateniĝis.

Kvara tago

Tutan tagon mi kuŝis, ĉar mi laciĝis, maldormante dum nokto. Posttagmeze ĉesis pluvi.

Morgaŭ mi eliros el Rakusisya, la vilao de persimona falo. Bedaŭrante adiaŭon, mi atente trairis tra ĉiuj ĉambroj, unuj post aliaj, tra la interna ĉambro kaj la enira ĉambro, kaj versis jene.

Ho, longdaŭra pluvado,

Sur la muro restas postsigno

De kolora papero, jam deŝirita.

[Samidare ya sikisi hegitaru kabe no ato]